"*Tia*" es otra palabra que encontramos en el conocido cuadro de voces simples. Como todas las palabras de ese cuadro, los términos que ahí aparecen están formados por dos partes. En este caso, sería "*TI*" + "*A*". Con "*TI*" nos referimos a algo concreto (*tio* = esa cosa, *tiam* = ese momento, *tie* = ese lugar...) Con la terminación "*A*" nos referimos a la cualidad (*a* = esa clase). Así que "*tia*" podemos traducirlo por "esa clase", "ese tipo". Así "*tia homo*" podría traducirse como "esa clase de persona", "ese tipo de hombre".

¿Podría haberse dicho "*tiu homo*" (ese hombre)? No, "*tia homo*" es más exacto. Con "*tiu homo*" nos referiríamos a un hombre en concreto, pero como tal, no porque tenga una u otra característica. Sin embargo con "*tia homo*", no nos referimos a una persona en concreto, sino a todas aquellas que tienen esas características. En la historia, la característica a la que se refiere el oso, es la de las personas que son capaces de dejar a un amigo solo ante el peligro.



Olivares troviĝas en fruktodona ebenaĵo flanke de la rivero *Guadamar*, proksime al la urbo Sevilo. Eniri en ĉi tiun belan vilaĝon egalas al vivi en la 16-a jarcento, konata kiel la "ora hispana jarcento", pro la fakto, ke Olivares posedas monumentajn konstruaĵojn de tiu epoko.

Proksime al la loko kie nun troviĝas Olivares, romia militisto nomita *Turculus* starigis setlejon. Ne tro fore, estas eble vidi restaĵojn de akvedukto, kiu provizis la faman urbon *Itálica* per akvo el la rivero *Guadamar*.

Blazono de Olivares



De la islama konkero de tiu zono nur restas turo de la 11-a jarcento, starigita kun defenda celo por kontroli apudajn vojojn. La kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la vilaĝon meze de la 13-a jarcento, tiam li donacis la urbon al infantoj de Kastilio Manuel kaj Fadrique. En la jaro 1356 tiutempaj kronikoj diras, ke tiu vilaĝo nomiĝis *Estercolinas* kaj ties reganto estis la kastilia Senjoro Álvaro Pérez de Guzmán.

Lia filo Pedro de Guzmán estis fidela servisto dum centr-eŭropaj militoj de la imperiestro Karolo la 1-a, kiu en la jaro 1535 nomumis lin "Grafo de Olivares". Kiel ido de la reganto de *Estercolinas*, la nova grafo de Olivares ricevis ankaŭ la administradon de tiu urbo. Li tuj ŝanĝis la nomon de la vilaĝo per la nomo de sia nobela titolo "Olivares". Naskiĝis tiam la grafolando de Olivares.

La nova grafo de Olivares decidis konstrui palacon laŭ la tiama itala renesanca stilo. Poste, la dua grafo de Olivares konstruigis belan preĝejon. La tria grafo de Olivares estis Gaspar de Guzmán, li fariĝis favorato de la

hispana reĝo Felipe la 4-a, trakuris tiam la komenco de la 17-a jarcento. Ekde tiam, la vilaĝo Olivares estis konata kiel la tiutempa rezidejo de la plej grava homo, post la reĝo, en Hispanio, la Grafo-duko de Olivares.

La grafo-duko beligis la ekzistantan palacon, li same ricevis la rajtigon de la Papo Urbano la 8-a konstrui kapitulnan preĝejon en Olivares. Pro ĉi ĉio, Olivares estas unu el la plej belaj lokoj en Andaluzio por admirii renesancajn kaj barokajn konstruaĵojn.



Don Gaspar de Guzmán, Grafo-Duko de Olivares, (1587-1645) pentrita de Velázquez.

Olivares nuntempe estas tipe andaluzia vilaĝo, kun 10.000 enloĝantoj, kies ĉefa viv-rimedo estas la terkulturado. Tie oni produktas tritikon, sun-florojn kaj oliv-arbojn. Ĉiujare ties mezepoka merkato

memorigas al olivares-anoj kaj vizitantoj la gravecon de la urbo dum la "ora hispana jarcento".

Monumentoj

La Grafa Palaco.-

Temas pri belega konstruaĵo, starigita komence de la 16-a jarcento, kiel rezidejo de la Grafo kaj ankaŭ kiel administrejo de la graf-lando. Ĝi havas belan fasadon kaj centran korton, laŭ ĝenova stilo, kun marmoraj kolonoj. Ĉe la fasado estas videblaj kvin balkonoj kun moriskaj elementoj, tio estas karakterizaĵo de la sevila renesanca stilo. Nuntempe ĝi estas la urbodomo de la vilaĝo.



Turo de San Antonio.-

Starigita de la araboj dum la 11-a jarcento, ĝi utilis por kontroli apudajn vojojn. Ene de la turo ekzistis tri etaĝojn, tamen ili ruiniĝis. Ne ekzistas restaĵoj de ŝtuparo do, supozeble, ekzistis ligna ŝtuparo por ascendi de unu etaĝo en alian.

Kapitula Preĝejo de Nia Sinjorino de la Neĝoj.-

La dua Grafo de Olivares disponis monon en sia testamento cele la konstruon de kapelo sub la nomo de la Virgulino de la Neĝoj. La konstruo finiĝis en la jaro 1658. Kvankam pripensita unue nur kiel kapelo kie povus esti entombigitaj la membroj de la familio Guzmán, t.e. la grafoj de Olivares, oni ricevis privilegion de la Papo Urbano la 8-a por havi la rangon de kapitula preĝejo, kun abato, kanonikoj, 12 pastroj kaj ĉefpastro.

Fine de la monato septembro okazas la pilgrimado de la oliv-ekrikolto. Tiam, partoprenantoj en tiu festo veturas per tipaj ĉaroj, ornamitaj kun oliv-arbaj simboloj.

Gastromonio

Bongustaj kaj tipaj estas la legoma kuirajo kun kikero kaj gado. Ankaŭ kokido kun migdaloj kaj la kocido kun leontodoj.

Je la deserta horo, oni devas gustumi ringan kukon kun mielo kaj sukero, same oliv-oleajn tortojn kun oranĝo.



Festoj

Dum la monato aŭgusto okazas la festo de la Virgulino de la Neĝoj. Samtempe okazas ankaŭ tipa andaluzia foiro, kies origino estis besta foiro, unu el la plej antikvaj en la sevila provinco.

Kapitula preĝejo de Nia Sinjorino de la Neĝoj

*Venontinnumere
Turismi en ...*



GUADIX (Granado)



Laŭ decido de Hispana Esperanto-Federacio la Hispana Kongreso de Esperanto de la jaro 2023 okazos en la urbo Sevilo, de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro. Sur la venonta numero ni jam informos pri programo, kongresejo, ekskursoj, kulturaj agadoj ktp.

Nun, vi ne forgesu rezervi tiujn tagojn por veni en Sevilon !



Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Juan Lobo Gago. Sevila anarkisto kaj esperantisto

Kiam la anarkisma movado ekdisvolviĝis fine de la 19-a jarcento, ties agadoj estis ofte konsiderataj de la tiama socio, ĉefe de la potenculoj, kiel krimaj aktoj. Élisée Reclus, fama franca anarkisto kaj kunulo en malliberejo de la inicianto de la anarkismo, la rusa Petro Kropotkin, eĉ pravigis ne nur teroristajn atakojn sed ankaŭ simplajn rabadojn faritaj de anarkistoj por supervivi, li konsideris tion nur kiel eksproprieton. Do, kiu ajn atako kontraŭ politikistoj, industriistoj, kapitalistoj aŭ komercistoj estis foje tre bone akceptata de anarkistoj dum tiuj unuaj jaroj, kvankam por la plejmulto el la socio ili estis rigardataj kiel krimuloj aŭ rabistoj.

En Andaluzio la maljusta distribuado de la tero kaj la ekzisto de ter-laboristoj kun mizeraj salajroj havigitaj de ĉiopovaj bienhavantoj faciligis la disvolviĝon de la anarkismo. Tiel, ĉi tiu movado en Andaluzio estis multe pli ofta dum la unuaj jardekoj de la pasinta jarcento ol aliaj politikaj movadoj, kiel socialismo aŭ komunismo.



Juan Lobo Gago

Alia flanko de la anarkisma movado en Andaluzio estis la kulturaj kaj edukaj agadoj. La profesoro de la Universitato de Kadizo, D-ro Gutiérrez Molina, asertas, ke la anarkismaj rondoj disvolvigis vastan kulturen agadon en nia lando. Tiel, ĉi tiu movado ebligis la eniron de avangardaj movadoj, kiel vegetaranismo, nudismo, novmaltusismo kaj Esperanto.

Tiel, kvankam ofte anarkistaj aktivistoj estis konsiderataj kiel krimuloj, kaj verdire rabadoj plenumitaj de ili ne mankis dum tiuj jaroj, sur alia flanko ili ĉiam okupiĝis pri kulturaj aferoj.

Unu el tiuj andaluziaj anarkistoj estis Juan Lobo Gago. Li naskiĝis en la sevila vilaĝo Gillena en la jaro 1909. Profesie li estis lignaĵisto, li aktive membris en la Sindikato de Lignaĵistoj, kies tegmenta asocio estis la anarkista sindikato CNT. Li estis ankaŭ aktiva membro de la Ibera Anarkisma Federacio FAI.

En septembro de la jaro 1930 li ekigis siajn krimajn agadojn, kvankam kiel dirite, tio neniam estis komprenata de lia kaj de kunuloj kiel krimo, sed kiel anarkistaj agadoj. En tiu jaro li, kun la helpo de tri pliaj anarkistoj, arm-en-mane ŝtelis bienon en Dos Hermanas (Sevilo). Post ĉi tiu rabo li foriris en Kadizon, tie li estis arestata nur unu monaton post la rabado kiam li lernis esperanton. Verdire, rabado aŭ "eksproprietigo" laŭ li, estis tiel grava kiel kultura agado, ekz. lernado de la internacia lingvo.


Pro tiu delikto li eniris en malliberejon, tamen la alveno de la respublika sistemo en Hispanion ebligis lian liberigon, dank' al amnistio aprobata de la unua respublika registaro. En la jaro 1932 Juan Lobo estis denove arestata post rabo en fabriko, prokuroro postulis dum la jura

proceso ses jarojn da enkarcerigo, tamen la kondamno ne estis tiel alta kaj fine de tiu sama jaro li denove estis libera. Li revenis en Sevilon kaj tie li ree estis arestata por nova rabado.

Juan Lobo Gabo, kiu uzis aliajn kaŝnomojn kiel Fernando García Jiménez aŭ José María Pagés Avilés, forfuĝis el Hispanio post la venko de la ribelanta armeo en la civitana milito. Unuamomente li iris en Francion kaj post la dua mondmilito li iris en Germanion. Tie li daŭrigis sian anarkistan agadon, ĉiam en kontakto kun aliaj anarkistaj hispanaj asocioj, kiuj ekziliigis en Meksikio post la milito. Sian kulturen flankon li neniam forgesis, do li estis ofta kunlaboranto kun la revuo "Tierra y Libertad", (Tero kaj Libero) eldonita de hispanaj anarkistoj en Meksikio.



Ĵurnalo "Tierra y Libertad" oficiala organo de la Ibera Anarkisma Federacio



$E = m c^2$ *Scienca Angulo*

Kiom da fojoj oni povas uzi oliv-oleon en fritado ?

Sciencaj esploristoj de la Universitato de Jaeno ekigas studon por scii kiom da fojoj estas eble uzi saman kvanton da oliv-oleo por friti manĝaĵojn. Sciate, ke post kelkaj kuiradoj, ĉiuj oleoj produktas ne-deziratajn postrestaĵojn. Do, la celo de tiu esploro estas koni ekzakte kiom da fojoj la oliv-oleo povos esti uzata kun bonaj uz-kondiĉoj. Ĉi tiu studo disvolviĝos ĝis la monato oktobro 2024.

Kompreneble, oni devas priatenti kelkajn variablojn, ne nur la kvaliton de la oliv-oleo, sed ankaŭ la kondiĉojn de la konservado, temperaturo, ktp. Unaumomente, oni kalkulas ke la oliv-oleo povas esti uzata pli ol duoble ol aliaj oleoj, kiel la sunflora.



La plej konataj kuiristoj preferas ne uzi saman oliv-oleon dum pli ol kvin fritadoj. Ĉiam post ĉiu uzo estas necese forĵeti eblajn postrestaĵojn produktitajn dum la fritado. Alia grava afero estas eviti kompletan bruligadon de la oliv-oleo, pro la fakto, ke bruligita oleo obskur-koloriĝas, kaj tiu koloro povas esti transmissiita al ontaj fritadoj. Tamen estas necese diri, ke oliv-oleo eltenas eĉ 200 gradojn antaŭ ol bruliĝi.

Ĉiuj oleoj post fritiĝo produktas kemiajn postrestaĵojn, nomitaj aldehidoj. Sciencistoj asertas, ke tro granda konsumo de aldehido ne estas taŭga por nia sano, kvankam oni devas diri, ke la homo mem, tio estas sen konsumo de oleo, produktas ankaŭ tiun kemian kombinaĵon. Krome, oliv-oleo estas la grasa likvo kiu, post varmigo, malpli produktas aldehidon, se ni komparas kun aliaj oleoj kiel tiuj el la sunfloro aŭ la lin-semoj. Do, friti manĝaĵojn kun oliv-oleo estas pli bona opcio ol uzi aliajn oleojn.

Oliv-oleo, la verda andaluzia oro



Flamenko

La "jabera"

La malaga fandango troviĝas ĉe la origino de pliaj flamenkaj kantaĵoj, inter ili la *malagueña*, la *rondeña*, la *serrana* kaj la *jabera*. Pri ĉi tiu lasta flamenka stilo, la *jabera*, oni devas diri, ke la unua literatura mencio pri ĝi aperis meze de la 19-a jarcento, kiam verkisto parolis pri du kantaĵoj aŭskultataj okaze de flamenka festo, unu la *malagueña*, alia la *jabera*.

La nomo mem de la kantaĵo "*jabera*" havas belan naskiĝon. Oni diras, ke en la malaga kvartalo *Trinidad* loĝis du fratinoj kies okupo estis la disvendado de sekigitaj faboj, uzitaj en tiu tempo kiel furaĝo por nutri bestojn.

En la hispana lingvo "faboj" estas "habas", ĉi vorto kun la aspiracio de la litero h, tipa en kelkaj andaluziaj lokoj, fariĝas "*jabas*" (prononcu: "habas"). Tiel, homoj kiuj disvendis tiun produkton estas "jaberos" (fab-vendistoj) aŭ "jaberas" (fab-vendistinoj). Tiuj du fratinoj surstrate prikriis por disvendi fabojn kun tre speciala flamenkigita melodio kaj tio fariĝis tre populara en Malago. Aperis tiam la flamenka kantaĵo la "*jabera*".



Kvartalo Trinidad en Malago
19-a jarcento

Rilate la kantaĵon mem, kvankam laŭdire ties origino situas ĉe la malaga fandango, verdire ĝi havas proprajn kaj tre malsimilajn karakterizaĵojn. Tiel, la *jabera* finiĝas per "rompita kadenco", ŝajnas ke la voĉo de la kantisto apenaŭ povos atingi la deziratan tonon. Same, dum la kantado la voĉo devas ascendi de basaj tonoj ĝis aliaj akutaj kaj ofte, la kantado estas malmola kaj raŭka. Pro tio, kelkaj fakuloj pri flamenko asertas, ke ĉi tiu kant-stilo ne povas deveni de la tipaj malagaj kantaĵoj, kiuj estas dolĉaj, plen-emociaj kaj profundaj. Se paroli pri la strukturo de la kantaĵo, la *jabera* enhavas koplojn

kun kvar aŭ kvin ok-silabaj versoj. Ofte kantistoj ornamas la kantadon per siaj propraj fiorituroj.

Se ni parolas pri kantistoj, *Niño de Málaga* en la jaro 1955 kantis *jabera*-n, kiu aperis en la Antologio de la Flamenka Kantado. Poste aliaj flamenkaj kantistoj kiel *Mimi* aŭ *El Canario de Madrid* kantis laŭ ĉi tiu stilo. Aliaj pli konataj flamenkaj kantistoj, kiel *Fosforito*, *Enrique Morente* aŭ *Curro Utrera*, de tempo al tempo ankaŭ kantis *jaberas*.



Francisco Eduardo Paloma Ligeró
El Niño de Málaga

"Malagueña de la Jabera"

*Ĉe mia koro mi vin portas
vi estas mia sola am'
kaj se mi de vi iam foras
mi ne trinkos el alia fontan'
eĉ se mi pro soif' mortas.*

"Jabera de Niño de Málaga"

*Berkonusojn mi iam tranĉis
en la pin-arbar de la am'
el la trunko rompiĝis split'
najl-vundis mian koron ĝi.
Mi mortis, ploru pri mi, virin'!*



Estas eble aŭskulti "jabera"-n de *El Niño de Málaga* ĉe:

https://youtu.be/RX4JDrXE0_I



Fervojista Angulo

La unua fervoja linio en Andaluzio

En la jaro 1829 la hispana registaro donis al S-ro José Díez Imbrechts, kadiza entreprenisto, koncesion je fervojoj, por la konstruado kaj ekspluatado de la linio inter Jerezo kaj El Puerto de Santa María. La ĉefa celo de ĉi tiu linio estis la transporto de bareloj da vino en Brition, tra la haveno de El Puerto de Santa María. Tamen, okazis financaj problemoj kaj la tiel nomata "trajno de la vino" devis atendi kelkajn jardekojn.

La hispana registaro donis koncesion en la jaro 1852 al S-ro José Joaquín Figueras por la konstruo kaj ekspluatado de fervoja linio inter Sevilo kaj Andújar, en la jaena provinco. La celo de ĉi tiu linio estis ebligi la komunikadon norden kun Kastilio kaj Madrido kaj suden kun Jerezo. Tiel, ekzistis fervoja linio inter Madrido kaj la atlantika haveno de Kadizo.



Stacidomo en Placo Armas en Sevilo

S-ro Figueras ekkolektis monon por konstrui la linion, tamen li baldaŭ rezignis sian pretendon konstrui la fervojan linion ĝis la vilaĝo Andújar. Fine, la linio estus konstruita inter Sevilo kaj Kordovo. Post la ekkonstruo de la unuaj fervojaj kilometroj S-ro Figueras vendis sian koncesion al franca kompanio, kiu en la jaro 1857 fondis la entreprenon "Fervoja Kompanio de Kordovo en Sevilon".




Stacidomo de Kordovo
19-a jarcento

Ĉi tiu nova kompanio daŭrogis la laborojn, jam komencitajn, de la antaŭa entreprenisto. Laboris en la konstruado de la fervojoj pli ol 3000 laboristoj, en la monato marto de 1859 la laboroj inter la urbo Sevilo kaj la vilaĝo Lora del Río jam estis finitaj. Same en aprilo finiĝis la konstruado inter Lora del Río kaj Kordovo, do, meze de la jaro 1859 la fervoja linio inter Kordovo kaj Sevilo jam estis preta. Onidire, la entuta kosto estis 27 milionoj da francaj frankoj.

Ekde la unuaj jaroj da funkciado la fervoja linio estis ege sukcesa, kvankam de tempo al tempo estis necese rekonstrui kelkajn relajn kilometrojn, ĉefe tiuj kiuj troviĝis tuj apud la rivero Gvadalkiviro, pro la oftaj altiĝoj de tiu rivero. La fervoja linio havis jenajn haltejojn:

Sevilo - La Rinconada - Tocina - Guadajoz - Lora del Río - Peñaflor - Hornachuelos - Palma del Río - Posadas - Villarrubia - Kordovo.

Kvankam la fervoja linio ne trapasis



Apude al la konstruo de fervoja linio estis necese konstrui ankaŭ stacidomojn, kiuj ankaŭ apartenis al la entrepreno kiu ricevis la koncesion je fervojo. En Sevilo la franca kompanio starigis stacidomon en la Placo Armas, kiu utilis kiel fervoja stacidomo ĝis la jaro 1992. Ĝi ankaŭ estis konata kiel "Stacidomo de Kordovo". Siafoje, en Kordovo, la stacidomon oni konstruis fine de la avenuo Ameriko, ĝuste tie, tiutempe, situis la plej fora limo de la urbo. Tiu stacidomo restis ankaŭ aktiva ĝis la jaro 1992.

du gravajn vilaĝojn, kiel Carmona kaj Ecija, la kompanio mem konstruis aŭ plibonigis vojojn por iri de Carmona en Guadajoz, kaj de Ecija al Palma del Río, tiel oni ebligis fervojan aliron de tiuj du grandaj sevilaj vilaĝoj.

La ekonomia rezultoj de la linio ĉiam estis bonaj. En la jaro 1875 la franca kompanio kontaktis kun alia grava fervoja kompanio MZA (Madrido-Zaragozo-Alakanto), kiu fine aĉetis ekspluatadon de la fervoja linio inter Sevilo kaj Kordovo, la unua konstruita en Andaluzio.


nun ni

junulara paĝo

NOMOFOBIO

Ĉu vi iam palpis la poŝojn de via pantalono por konstati, ke via smartfono estis tie? Ĉu vi tuj nervoziĝis ĉar la saĝtelefono ne troviĝis tie? Ĉu vi scias kio estas nomofobio?

Fobio estas psika perturbo karakterizata de intensa angoro rilate lok-situacion, socian situacion aŭ difinitan objekton, de kompulsia emo eviti tion. Ekzemple, se al vi kaŭzas malordon la fermitaj lokoj, vi suferas klostrofobion. Male, se vi evitas angore malfermitajn grandajn liberajn spacojn, eble vi suferas agorafobion.



Nuntempe, kiam multaj homoj uzas smartfonojn, ofte oni sentas angoron se ĝi ne povas esti uzata pro manko de vifia aliro, pro forkonsumiĝo de la baterio aŭ pro aliaj aferoj. Tiu angoro nomiĝas "nomofobio".

De kie devenas tiu vorto? Nomofobio devenas el la angla esprimo *non-mobile-phone-phobia*. La vorto aperis unuafoje en la jaro 2008.

Laŭ statistikoj preskaŭ la duono de la uzantoj de smartfonoj sentas tiun angoron, same en 90% el la uzantoj tio ne estas simpla fobio sed terura angoro. Se paroli pri genroj, viroj sentas pli ofte tiun nomofobion ol virinoj, pri la aĝo, estas pli ofte trovi tiun psikan perturbon inter junuloj 18 / 24 -jaraĝaj.

Psikologoj asertas, ke ne temas pri malsano, sed pri simptomo de dependeco al poŝ-telefono. Tiel, laŭ esploro de la Universitato de Granada, altgradaj nomofoboj tute ne akceptas la ideon eliri el la hejmo sen telefono, same, ili ne povas esti kvar horojn sen konsulti ĝin.



Aliaj asertas, ke nomofobio reale estas dependo de la teknologio. Tiel, multaj homoj bezonas revizii ofte ĉu oni ricevis en la smartfono mesaĝojn aŭ informojn, tio estas, konstati ĉiun sonon aŭ vibradon de la telefono. Alie, se oni konstatas tre ofte la smartfonon, tio pliiĝas la neceson revidi ĝin, ĉar laŭ esploro de brita universitato, des pli ni uzas la inteligentan telefonon ju pli nia streso pliiĝas, pro tio multfoje nomofobo imagas, ke la telefono sonis aŭ vibris.

Kaj vi? Ĉu vi bezonas revidi konstante vian telefonon?



LA KOSMA RADIADO

Restis multaj disigitaj triboj, ili luktis por pluvivi en mondo kun gigantaj bestoj. Ĉasantaj katoj estis la plej teruraj. Ni venis en la okcidentajn regionojn, ni sekvis sunon kaj esperon. Sed, ne estas facile esperi dum oni vivas. Laŭ niaj memoroj, neniu homo estis kapabla mortigi unu el tiuj bestoj kiuj vagadas sur la tero. Tiuj bestoj pligrandiĝis jarcenton post jarcento, tamen homoj restis kiel li ĉiam estis...



Staru kaj luktu! Se ni disigās, ni estos ĉasitaj unu post la alia !



Unuamomente, la anoj de mia tribo forkuris, sed laŭ mia ordono, ili haltigis kaj batalis.



Fine, timigita de niaj armiloj, la ĉas-kato returnis sin kaj foriris.



Mark neis per sia kapo. Dum la tuta vojaĝo li ofte ricevis kritikojn. Kelkfoje li deziris mortis sed li estis la tribestro kaj li devis iri antaŭen.

Du pliaj mortis. Kial? Nur pro revo! Almenaŭ tie orienten ni havis esperon plu vivi.

Ni mortas ĉi tie kiel en la oriento. Ni devas plu sekvi. Jen nia espero.





Ni ne rajtas ripoz. Ni devas sekvi antaŭen en ĉi tiu mondo de gigantaj bestoj. Ni devas memori la historion kiun niaj prapatroj rakontis... tiu tago kiam ĉio ekiĝis.



La detruado ne estis kaŭzita de homaj bomboj, sed de aerolitoj. Teruraj meteor-ŝtonoj falitaj sur la Teron.



Tuj, la radiado provokis strangajn rezultojn al vivaj entoj sur la Tero.



Ironio de la sorto, homoj toleris radiadon. Ni ne mutaciis. Ĉio ŝanĝiĝis, escepte ni...



Ni restis tute same. Ĉiuj bestoj kaj plantoj kreskis generacion post generacio, sed ni ne.



Homoj fariĝis facila predo. Ni revenis en primitivajn epokojn, sed ni memoris la rakontojn de niaj prauloj.



Antaŭ multe da tempo, homoj preparis sin por kruelaj bataloj. Tiel, ili amasigis armilojn en fora tero okcidenten. Kiam mi fariĝis tribestro mi renkontigis mian popolon ĉirkaŭ mi.

Ne, Mark! Forgesu vian ideon iri okcidenten. Ĉi tie ni naskiĝis, ĉi tie ni devas resti!



Mark parolis kaj la tuta tribo sekvis lin.

Multaj el ni mortos, tamen tiuj kiuj pluviros povos lukti sukcese kontraŭ la gigantaj bestoj.



Mi ne volas esti facila predo por gigantaj bestoj. Ni devas serĉi l'armilojn kiujn nia prauloj gardis. Ni iru okcidenten !




Miaj vortoj ekscitis popolon al marŝado kaj la luklado.




Ĉe la malgrandaj lacertoj kreskis. Homoj fariĝis ĝiaj preferaj insektoj.



Ĉiuloke ni estis facilaj predoj por antaŭtempe sendanĝeraj bestoj...



Ni markis tiujn lokojn kie niaj amikoj mortis, sed ni sekvis nian vojon okcidenten.




Pli ol 100 homoj komencis la vojon, nun nur restis apenaŭ 50. Tamen, ni daŭrigis antaŭen.



Post kelkaj jaroj da longa vojaĝo ni apenaŭ estis dek. Ni trapasis montarojn, riverojn, marojn kaj la plej dezertajn kaj sekajn terojn.



Kaj milfoje mi pensis: kial la mondo ŝanĝiĝis? Kial ni ne kreskis kiel la ceteraj bestoj?



Mi sentis angoron pro miaj pensoj, tamen miraklo okazis, post jaroj da vojaĝo mi trovis ĝin, la urbon.

Rigardu !!




Niaj prauloj pravis! Ekzistas urbo tuj apud la maro. Jen ĝi!

Atendu!



Ni tendumos ĉi tie. Morgaŭ mi iros tute sola en la urbon. Mi eble trovos la armilojn.



Mi decidis iri sola. Se tie atendis min granda danĝero nur mi mortus, tamen mi vidis ke...



ĉio estis forlasita. La tuta urbo estis detruita. Neniu alia tribo loĝis tie. Eble tie troviĝus armiloj, sed ja neniu alia homo.



Mi revenis en la kamparon, tie teruraĵo okazis...

Mark!!!

Andreo! Kie estas la ceteraj kunuloj?



Mortintaj! Ĉiuj ili mortis !!!

Kio okazis?



Mi aŭskultis lian rakonton, tiam mi nur povis bedaŭri mian foriron

Kio okazis?

Lupoj. Ili atakis nin!



Andreo rakontis, ke lupoj atakis la kampadejon. Ili klopodis defendi sin, tamen nur li eskapis.

Kvankam ni atingos tiujn armilojn, ni eble ne sukcesos. Ili daŭre estos gigantoj!



Eble ni estas la lastaj anoj de la tribo, tamen restas pliaj homoj ie ajn.



La armiloj. Ĉu vi sukcesis trovi ilin?

Mi trovis ilin. Ni iru tien!





Dum la tuta iro li parolis pri la gigantoj, pri la radiado, pri la homoj kiu fariĝis predoj por ĉiuj bestoj, tamen mi ne atentis lin.



Tiam li silentiĝis, nienu bruo estis aŭdebla tie...


Tie estis raketoj kaj armiloj konstruitaj iam por mortigi homojn, nun ili utilus por mortigi gigantojn.



Tie amasiĝis milionoj da armiloj, tute ne-uzitaj, konstruitaj de homoj antaŭ multaj jarcentoj, sed...

Ne estis bestoj kaj vegetaĵoj kiuj ricevis la radion. Ili restis sensangaj, nur unu speco mutaciis kaj malgrandiĝis...

Ni eraris Andreo! Ni tute eraris. Ironie mi nun komprenas la tutan veron.





Andaluza Kuirarto

Kordova "mazamorra"

Oni diras, ke la mazamorra estas recepto kies origino troviĝas en la romia imperio. Tiel, en la libro de Apicius "De re coquinaria" (4-a jarcento p.K.), aperas kuirajo kies ingredientoj estas pano, oliv-oleo, vinagro, akvo kaj ajlo. En la 18-a jarcento, kiam populariĝis la kultivado de la tomato, frukto veninta de Ameriko, ĝi utilis por mildigi la ajlan guston, naskiĝis tiam la nuntempa kordovana salmorehon. Do, oni povas diri, ke la mazamorra estas la plej proksima antaŭajo de la salmoreho.



Jen la ingredientoj:

- Migdaloj, 100 gramoj.
- Pano, 200 gramoj, uzu prefere iom malmola pano de la pasinta tago.
- Salto.
- Vinagro.
- Oliv-oleo.
- Akvo.
- Ajlero.
- Nigraj olivoj.
- Malmole kuirita ovoj (2)



Oliv-oleo



Salto



Pano



Vinagro



Migdaloj



Ajlo



Akvo



Nigraj olivoj



Malmole kuiritaj ovoj

Kaj jen la preparado:

1) Trempu la panon en akvo. Memoru, ke pli konvenas por ĉi tiu recepto uzi iom malmolan panon, tiu kiu restis de la hieraŭa tago. Do, la celo trempi ĝin estas faciligi ties batado.

2) Pere de potenta kirlilo miksu la panon, jam sen akvo, salon, ajleron, vinagron kaj migdalojn. Ĉio miksitita iĝos blanka pasto.

3) Denove uzu la kirlilon, sed ĉi-foje kun malrapida potenco. Aldonu la oliv-oleon iom-post-iom. Aldonu poste sufiĉan kvanton da akvo. La pasto fariĝos pli likva.

4) Aldonu supre, kiel ornamaĵon, la nigrajn olivojn kaj tranĉitajn pecojn da kuiritaj ovoj.

BONAN APETITON !



Elektra kirlilo

Ĉu vi deziras kunlabori kun GAZETO ANDALUZIA?

Ĉi tiu revuo ne fariĝas dank'al artefarita intelekto? Tute ne! Ĝi aperas pro la penado kaj sindediĉo de homoj kiuj klopodas disvastigi la andaluzian kulturon pere de internacia lingvo. **Ĉu vi deziras kunlabori kun ni?** Se jes, ni estas pretaj aperigi viajn artikolojn, eseojn, desegnaĵojn, komentojn ktp. Ne hezitu! Andaluzio estas universo kaj estas necese uzi universalan lingvon por diskonigi ĝin.

Kontaktu kun:

cordoba@esperanto.ac



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Misteroj en Pilar de Moya (Jaeno)

Antaŭ kelkaj jarcentoj, kiam vojaĝoj fariĝis per ĉaroj kaj ĉevaloj, estis necese situi apud la vojo konstruaĵojn por ŝanĝi la ĉevalojn kaj ankaŭ por zorgi pri la necesojn de la vojaĝantoj. Kiam tiuj polvoplenaj vojoj iĝis asfaltistaj aŭtoŝoseoj, ankaŭ tiuj konstruaĵoj ŝanĝiĝis, do nuntempe multaj el ili estas aŭto-servejoj situataj flanke de la ŝoseoj.

Unu el ili, en la provinco Jaeno, troviĝas sur loko nomita "Pilar de Moya", ĝuste ĉe la voj-renkontiĝoj de la ŝoseoj A-306 kaj A-321. Sur tiu loko ekzistas baseno, kie homoj kaj ankaŭ ĉevaloj povis trinki akvon. Poste oni konstruis apudan aŭto-servejon, kun benzinejo kaj restoracio. Vi trovos ĝin se vi vojaĝas de Jaeno al Kordovo.

Pilar de Moya troviĝas je 20 kilometroj de la urbo Jaeno, la plej proksimaj vilaĝoj estas Torredonjimeno, je 7 kilometroj, kaj Porcuna je 14 kilometroj. Ĝi situas sur ebenaĵo, tie la aŭtoŝoseo sekvas rektajn liniojn, kelkaj el ili eĉ 5-kilometrojn longaj. Nur je 6 kilometroj ekzistas malfacila punkto, kie antaŭtempe ofte okazis akcidentoj.



"Pilar de Moya" en Jaeno, baseno kiu antaŭ jardekoj estis uzata por trinki akvon.

Eble unuavide temas pri trankvila loko, tamen, de antaŭ multaj jaroj strangaj eventoj okazas en tiu zono. Tie, misteraj entoj povas esti vidataj de tempo al tempo de stirantoj. Kelkaj el ili asertis, ke dum la stirado stranga figuro akompanis lin ekstere de la veturilo. Pro la fakto ke temas pri longaj rektoj, stiranto povas perfekte

rigardi tion kio okazas ekstere. Laŭdire, granda ento kun homa figuro kaj longa hararo situas apud la aŭtomobilo, eĉ se ĝi rapide iras.

Alie, stiranto asertis, ke subite aperis homo fronte al la veturilo, do la kolizio estis neevitebla. Kiam li povis haltigi la aŭtomobilon por rapide helpi la eblan vunditon, li konstatis, ke neniu estis sur la ŝoseo kaj eĉ la veturilo havis neniun spuron pri ebla kolizio. Sed ne nur tiuj strangaj incidentoj okazas sur la vojo, ankaŭ apud la baseno mem, de tempo al tempo, estas eble aŭdi kaj eĉ rigardi, laŭdire, infanojn en alitempaj vestaĵoj.

Kompreneble, neniu logika klarigo ekzistas por kompreni ĉi tiujn okazintaĵojn. Certe kelkaj akcidentoj okazis kiam la aŭtoŝoseo ne havis bonajn kondiĉojn, tamen vere tio okazis je kelkaj kilometroj, ne tuj apude.


Same, antaŭ kelkaj jaroj labor-akcidento, kaŭzanta kelkajn mortojn, okazis en apuda oliv-olea fabriko, jam ne ekzistantaj. Laste, tuta familio de laboristoj venintaj en apudan kamparan domon por partopreni en la oliv-rikoltado mortis pro bruligo.

Ĝuse televid-programo diskonigis, tiujn strangajn fenomenojn kaj tiel Pilar de Moya fariĝis unu plia mistera loko de Jaeno, la plej mistera provinco en Andaluzio



Pilar de Moya troviĝas en voj-kruciĝo de la provinco Jaeno, inter la vilaĝoj Porcuna kaj Torredonjimeno.

Vorto-Ludoj



Krucvorto

	1	2	3	4	5	6	7
A							
B							
C		■				■	
Ĉ				■			
D							
E				■			
F							

HORIZONTALE

- A. Organizita taĉmento de laboristoj, kune laborantaj sub unu ĉefo.
- B. (*Inverse kaj adjektive*) Mamulo loĝantaj en kavoj, kiu tre rapidas dank'al siaj postaj kruroj.
- C. Konsonanto montranta unu el la ĉefpunktoj. ■ Videbla en la aŭtomobiloj de la urbo Ljubljano. ■ Verba finaĵo.
- Ĉ. Nomo de cifero. ■ (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Antikva muzik-instrumento.
- D. (*Inverse*) Specialisto en scienco pri farado de vinoj.
- E. Ĝuste en ĉi tiu momento. ■ (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Folio kie aperas reprezentita parto de la globa surfaco aŭ porcio de la astra ĉielo.
- F. (*Inverse*) Honortitolo de la plej gravaj religiaj ĉefoj de ŝijaismo.

VERTIKALE

1. Longa kaj cilindra peco el ligno uzata por sin apogi.
2. Videbla sur la aŭtomobiloj en la urbo Bejruto. ■ (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Malgranda laŭborda ŝipo, rapide veturanta, havanta du aŭ tri mastojn.
3. Helena reĝo, alligita, en la Infero, al turniĝanta fajra rado.
4. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Ago kunigi plurajn aferojn per ia rilato de sinsekvo. ■ Romana cifero. ■ Simbolo de mezurunuo de pezo.
5. (*Adjektive*) Helena kaj Romana dio de la lumo, poezio kaj artoj.
6. Nomo de cifero. ■ (*Adjektive kaj plurale*) Estaĵo, apartenanta al la sekso kapabla gravediĝi kaj naski.
7. (*Inverse*) Unu el la kontinentoj.

Lingva Vojaĝo



Ĉu vi kapablas vojaĝi de la urbo Onubo ĝis Jaeno uzante nur vortojn?

Temas pri facila vojaĝo. Por solvi ĉi tiun enigmon vi devos nur diveni la kaŝitajn vortojn. Memoru, ke vi rajtas ŝanĝi nur unu literon en ĉiu paŝo.

O N U B O : la plej okcidenta provinca ĉefurbo en Andaluzio.

_____ : ricevu dum difinita tempo gazeton.

_____ : monunuo de orienta lando.

J A E N O : urbo kaj provinco en la nordo de Andaluzio, konata kiel "paradizo de la olivarbaro".

SOLVOJ AL LA PASINTAJ KRUCVORTO KAJ REBUSO

	1	2	3	4	5	6	7
A	A	M	E	N	T	O	J
B	Z	O	D	I	A	K	O
C	I	R	I		G		N
Ĉ	A	T	K	O	N		O
D	N	E	T		O	R	L
E	O	R	O		K	I	E
F	J	O	N	E	T	A	M

LINGVA VOJAĜO

- **AJAMONTO**
- **MAJORATO**
- **AMORANTO**
- **HOMARANO**
- **MOHAKARO**

HUMURO



Mi ne komprenas
kial la vorto "mallonga" estas
pli longa ol "longa".

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





81

a

HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Sevilo, 12an-15an oktobro 2023